

BELGA ESPERANTO-FEDERACIO



62a jaro n° 1

januaro - februaro - marto 1970


61a jaro n° 4
oktobro - novembro - decembro 1969

Sonorilo

TRIMONATA BULTENO DE B.E.F.

REDAKCIO : Jaumotte Maurice
Roose Fernand, Sint-Klaradreef 59, Brugge Tel. (050)319.81
Maertens Grégoire
Poupeye Charles

ADMINISTRADO : Terryn Juliette, Raapstraat 72, Gent



ASOCIO SEN PROFITA CELO SIDEJO
Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken Tel. (03)276643

HONORA ĜENERALA PREZIDANTO
Jaumotte Maurice

HONORA PREZIDANTO HONORA VICPREZIDANTO
Dro Kempeneers Paul Sielens Henri

PREZIDANTOJ
Debrouwere Gerard, Magdalenastraat 29 Kortrijk
Dro Denoël Pol, 20 rue V. Raskin Liège

VICPREZIDANTO
Roose Fernand

ĜENERALA SEKRETARIO
Verstraeten Jules, Sint Bernardse Steenweg 1078 Hoboken

SEKRETARIO POR LA NEDERLANDLINGVA REGIONO
Maertens Grégoire, Prins Leopoldstr. 51, St.-Kruis
Tel. (050) 349 35

SEKRETARIO POR LA FRANCLINGVA REGIONO
Paulus Raymond, 73, rue de Montignies, Charleroi

KASISTO Baticux René, Oude Donkiaan 83 Deurne

POSTKONTO DE B.E.F. : 1634 34 OUDE DONKLAAN 83 DEURNE

ĈEFDELEGITO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Fino Orsolini A.
rue P. Pastur 6, Charleroi P.K. 2016 40

55-a Universala kongreso de Esperanto

Vieno, 1 - 8. 8. 1970

Konstanta Adreso : Nwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

OFICIALA KOMUNIKO

Filmprezentadoj dum la 55-a UK

Plenumante la deziron de multaj kongresanoj, la kongresorganizantoj enprogramigos kelkajn filmprezentadojn al la kongresa programo. Kunlige al tio, ili petas ĉiujn Esperanto-instancojn, kiuj posedas prezentindan filmon kun esperantlingva teksto aŭ je konvena temo, aŭ scias pri tiu, komuniki kaj proponi tion al la LKK. Samtempe oni klopodu iniciati ĉe koncernaj (turismaj, naturamikaj, komercaj ktp.) entreprenoj eldonon de novaj filmoj en la Internacia lingvo. Noto : evitendaj estas filmoj ne neŭtralaj.

TEJO kongresos en Graz

La 26a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos en aŭstra urbo Graz unu semajnon post la UK, t.e. inter la 8. - 15.8.70. Oni esperas, ke tiu ĉi novaĵo estos vaste publikigata kaj la junaj esperantistoj tra la mondo havos baldaŭ okazon por aliĝi. Adreso de la LKK estas ĉe S-ro Heinz Kovacic, Grazbachgasse 57, A-8010-Graz, Aŭstrujo.

Internacia Film-Konkurso

La Estraro de UEA kaj la LKK de la 55a UK anoncas internacian konkurson por filmamatoroj pri dokumenta filmo pri la 55-a UK en Vieno 1970. Formato 8mm, daŭro maks. 30 min., laŭvole kolora aŭ nigre-blanka. Premioj ĝis 300,-gld plus filmmaterialo. Detaloj aperos en la Dua Bulteno.

Ekzamena Komisiono

La Internacia Ekzamena Komisiono (IEK) denove ekzamenos kandidatojn en Vieno okaze de la UK. Ĉiu, kiu deziras kandidatiĝi petu la informojn ĉe la Sekretario de IEK, s-ro J.C. Wells, 17 Ashbourne Terrace, London S.W. 19, Britujo. Aldonu int. respondkuponon.

Grava noto

Pagontaj aliĝantoj bonvolu noti, ke pagante per banko aŭ bankĉeko, ili afable aldonu 1,-gld aŭ ekvivalenton por bankkostoj. Dankon !

Malgraŭ ke Esperanto jam ekzistas pli ol 80 jarojn, estas ankoraŭ relative multe da personoj kiuj neniam aŭdis pri ĝi. Tio okazas en lokoj kie vivas nur kelkaj izolitaj esperantistoj kaj, en pli grandaj lokoj, ĉe parto de la junaj generacioj.

Sed niaj personaj gekonatuloj kompreneble jam (ofte) aŭdis pri E. Ili scias ke ni okupiĝas pri ĝi kaj ke ni propagandas. Ili sincera aŭ pro forma ĝentileco igas ilin demandi foje kiel fartas nia movado, ĉu E. progresas, ĉu oni baldaŭ instruos ĝin en la lernejo ktp ktp. Se al tiu demando ni volas doni ĝustan respondon, tiam tiu respondo devas esti nuancoplana.

Sed unue, ni mem demandu al ni en kiu grado ni kredas je tio kion ni volas diri al nia demandanto.

Vi mem, karaj gelegantoj, karaj geesperantistoj, kion vi pensas pri la stato de nia movado ? kaj pri la ŝancoj de ĝi ?

Volonte ni aperigos viajn opiniojn, konvinkojn kaj argumentojn. Interŝanĝo de ideoj de niaj gelaborantoj sur nia tereno povas esti plej instrua kaj plej interesa.

Ni, niaflanke, ni volas komenci tiun eventualan debaton per jenaj konsideroj.

Unue ni devas konsciiĝi pri kelkaj faktoj..... kaj poste vidi kiujn konkludojn ni eble povas fari el tiuj faktoj.

Unu fakto estas la ne-neebla fakto de la kontraŭstaro al Esp. En tiu rilato, la historio de nia peticio ĉe la sekretario de UNO estas signifoplena. Inter krampoj : kun grandega scivolemo ni atendas la publikigon de detaloj pri tiu afero. Tiun eventon ni povas, kaj eble devas, vidi en pli larĝa kadro : tiu de la daŭra lukto - duparta: ekonomia kaj politika - de la grandaj potencoj. Kiom ajn oni oratoras kaj verkas pri unuiĝo de Eŭropo aŭ eĉ de la mondo, la grandaj potencoj ankoraŭ strebasal propra nacia superregado. Tiu strebado havas ankaŭ lingvan flankon. Ĉie kie ili povas, ili klopodas por favoriĝi en internaciaj rilatoj la pozicion de sia nacia lingvo. Kontraŭ ĉia racieco ; eĉ ofte kontraŭ ĉia justeco. Kun diskriminacio, kiun alie ili per la buŝo tiel akre kondamnas. Kontraŭ tiuj grandaj potencoj povus formiĝi fronto de malgrandaj nacioj. Sed tio ne efektiviĝas. La politikaj gvidantoj de tiuj malgrandaj nacioj timas, aŭ estas iamaniere ligitaj al tiuj grandaj potencoj. Tiurilate same signifoplena estas la fakto ke

multaj eminentuloj laŭdas nian laboron kaj promesas subtenon... okaze de iu nia kongreso... sed silentas en aliaj okazoj, kie ili vere povus ion fari.

Ĉu el tiu fakto ni ne rajtas, aŭ devas konkludi ke la tago de la ĝenerala akcepto de Esp. kiel internacia lingvo, kuŝas certe ne en proksima estonteco ?

Alia fakto estas tiu de la rapidega evoluo kiun nia konas. Evoluo de tekniko, de la sciencoj, de homaj aktivecoj kiel la turismo, okazas je kapturita ritmo. Kaj tio okazas inter-nacie. Do, tute kompreneble ke la lingvaj malfacilaĵoj kreskegas. Ĉiuj scias tion kaj spertas tion kiuj agadas inter-nacie. Do estas ankaŭ nature ke pli kaj pli da instancoj kaj diversaj gvidantaj personoj konvinkiĝas pri la neceseco de internacia lingvo. Ne ĉiuj pensas ke tiu lingvo nepre devas esti la neutrala Esperanto. Sed ne malmultaj inter ili tuj komprenis ke neniu nacia lingvo povas iam iĝi tiu internacia, de ĉiuj nacioj adoptita lingvo, pro la interbatalego de la grandaj potencoj. Lasttempe frapaj ekzemploj estis la oficialigo de Esp. ĉe la jamboreo ; do en tiu medio kiu longtempe estis kontraŭ nia lingvo. Niaj gesamideanoj diskonigu ankaŭ plej eble multe tiun diron de la Angla delegito Sir Leslie Glass en unu de la lastaj diskutoj en la UNO : "eble iam, lasante flanke la fieron pri la naciaj lingvoj, ni ĉiuj lernos unu komunan duan lingvon. Se la popoloj povus interkomuniki per unu internacia lingvo, tiam estus preskaŭ nenio kion la homaro ne povus atingi". Tiu diro estas interesa multilate.

Ĉu el tiu fakto ni nun rajtas konkludi ke nia venko estas tamen proksima ? Bedaurinde ne. Unue, supre cititaj personoj estas ankoraŭ malplimulto. Due, ili ne havas la povon por leĝaj decidoj.

Do, ĉu Esperanto venkos ? Se jes, ĉu ni devos ankoraŭ longtempe atendi ? Tio estas afero..... de kredo !

Mi konas gvidanton de Eŭropa instituto. Li estas por Esperanto. Sed li ne kredas ke ĝi venkos. Li vidas en la historio nur daŭran lukton de grandaj potencoj. Ni, kontraŭe, kredas ke la situacio evoluos tiel ke finfine oni ne povos plu elsaviĝi sen internacia lingvo. Mi, persone, kredas ke tio daŭros ankoraŭ longtempe. La vere grandaj revolucioj, tiuj kiuj tre profunde ŝanĝas la homajn vivkondiĉojn, okazas (tre) malrapide.

Eble vi argumentos ke kun tiaj perspektivoj oni ne kapablas al-tiri multajn adeptojn al nia lingvo. Ja, laboro kun la perspektivo ke nur niaj posteuloj vidos la realiĝon, estas tre idealista sinteno.

Vere : Kaj tamen ni ne prisilentu tiun idealisman sintenon. La nunaj multaj protestmovadoj fakte ankaŭ celas idealojn (kontraŭ ĉia korupteco kaj ĉia diskriminacio. Por vera demokratio en ĉio, ankaŭ en instruado, en gvidado de entreprenoj ktp.).

En multaj landoj grupoj de gejunuloj esprimas sian naŭzon je la de ili suspektita plutokratio, je imperialismo, je la abomeninda milito, je korupte funkciaj institucioj. Multilate ili volas sanigon de putraj situacioj ; ili volas raciecon ; egalrajtecon. Strange ke ili ne metis en sia programo Esperanton por vere egalrajta komunikado inter ĉiuj popoloj. La

kaŭzo (j) ? Ĉu ili ne konas nian movadon ? Ĉu ĝis nun ni neglektis informi ilin ? Ĉu ni ne povus prezenti al ili Esperanton kiel novan idealon respondantan al reala bezono de la homaro ? Ĉu eble estas nur tio ke ni ne trovis la ĝustajn trafikajn vortojn por konvinki ilin ? Povus esti ke la hodiaŭa junularo estas pli idealista ol ni pensas. Ĝi ja ŝajne volas starigi pli belan, pli justan mondon. Ĉu ĝi ne volas starigi iun paradizon en tiu-ĉi mondo ?

Ni evidentigu la realajn pozitivajn aferojn kiujn la kono de Esp. prezentas al ni. Ekzemple ĝia universala disvastiĝeco kiu starigas kontaktojn de ĉiuj kun ĉiuj en la mondo. Ekzemple ĝia organiziteco kiu ebligas multegajn valorajn servojn al la uzantoj. Ekzemple ĝia instruado kiu estas valora helpo en la lernado de aliaj lingvoj kaj kiu estas tre mensforma.

Por fini. Estas nia profunda konvinko ke ni laboras por la estonteco. La evoluo de la homo estas io kion ne kapablas dikti iu(j) ajn homo(j). Tio al ili eskapas. Tion ili kapablas nur registri. Kaj la homo finfine estas devigata adaptiĝi, kaj adapti vivregulojn al tiu evoluo. Nu, se la evoluo iros en tiu direkto ke internacia lingvo neŭtrala iĝos necesa, tiam ĝi realiĝos, malgraŭ ĉiuj kontraŭstaroj. Sajnas al mi ke la evoluo iras efektive en tiu direkto. Do, ni firme kredas ke ni ne laboras vane, tute kontraŭe.

Kaj intertempe ni estas kontentegaj pro ĉio kion Esperanto kaj ĝia movado jam donis al ni.

Drs. F. ROOSE

HELSINGÖR

La internaciaj feriaj Esp-kursoj de Helsingör okazos 19.-26. de julio en La internacia Altlernejo (tute moderna). Venu al Danlando por ĝui belan ferio-semajnon en vere Esperanta rondo. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis
Ingemannsvej 9
DK-8230 Abyhoj, Danlando

NB. Aŭtunaj feriaj Esp-kursoj okazos en la altlernejo JUNAJ HEJMOJ ĉe Arhus, Danlando, 18. - 24 de okt. Programo baldaŭ havebla ĉe L. Friis.



KRONIKO

INTERESAJ ESPERANTISTAJ

OKAZONTAĴOJ DUM 1970

1) La muzeo de J.A. Komensky (=Comenius) en urbo Prerov en Ĉeĥoslovakujo aranĝos kune kun la Ĉeĥa Esperanto Asocio : INTERNACIA KONFERENCO PRI JAN AMOS KOMENSKY

Ĉiuj partoprenantoj ricevos materialojn por disvastigi la sciojn pri Komensky en siaj landoj. Precipe la instruistoj povos uzi tion. Eminentaj Ĉeĥoslovakaj kaj alilandaj fakuloj faros prelegojn. La kotizo - sescent Ĉeĥoslovakaj kronoj - inkluzivas manĝojn, tranoktojn kaj ekskursojn. Dato : de sabato 25.7.70 ĝis jaŭdo 30.7.70. Oni facile povas atingi Prerov per trajno ; ĝi situas je 20 Km. de Vieno. Ĉiujn informpetojn kaj aliĝojn oni direktu al : Muzeum J.A. Komensky, Ph. Dr. Gustav Vozda, direktoro ; Horni nam. ĉ.l. :PREROV Ĉeĥoslovakujo.

2) Eŭropa Feriosemajno en Svislando.

Tion organizos je la 12a fojo la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj en GWATT apud la lago THUN de la 23a ĝis la 29a de Aŭgusto. La ekskursoj okazos en la belega regiono de la Berna Oberlando (i.a. al Grindelwald, Lauterbrunnen, Muerren k.a.). La aliĝkotizo estas 15 Sv. Fr. Adreso : Ernst Glätti ; Laurstrasse 17 ; CH-5200 BRUGG Svislando.

3) 62a Franca Kongreso de Esperanto kaj 2a renkontiĝo Franca-Itala en Monte-Carlo dum la Pentekostaj tagoj.

Okazos interesaj ekskursoj al Vallauris kaj Tende kaj same interesaj vizitoj ekz. al la mondfama Oceanografia muzeo. Opero kaj kastelo estos ankaŭ vizitataj. La programo estas ege alloga. Aliĝo estas senpaga por eksterlandanoj. La prezo de la ĉambroj tre varias kaj komencas je 14.50 Fr. Fr. por unulita kaj 18.50 por dulita ĉambro. Petojn pri informoj kaj aliĝojn oni sendu al S-ano Jos Derks ; 8, Boulevard d' Italie Monte-Carlo ; Monako.

4) Esperantista Kulturdomo (Fondinto : H. Micard)

Kastelo Gresillon 49 Baugé, Francujo
Alveno la 28-an de Junio — Foriro la 12-an de Julio
Seminario por kurs-kaj Grupgvidantoj

Rolo de teatro en la aktivigo de grupo aŭ kurso. (gvidota de S-ino Vincent, s-ro Ribot, s-ro Thierry)
Ekskurso la 8-an de Julio.

Dua Periodo

Alveno la 12-an de Julio — Foriro la 26-an de Julio
Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj
Teatro-arto La 24-an : Teatro-prezento.
Ekskursoj la 17-an kaj la 22-an de Julio.

Por ĉiuj viaj asekuroj - reasekuroj

unu adreso :

J. VERDYCK & Co Pvb.

ANTWERPEN, 8, Vleminckveld

Telef. 03/320902 - Telekso 32283 - Telegr. "Dyckassur"

Oficejoj en London - Rotterdam - Lieĝo.

Reprezentanto ĉe "Lloyd's - London"

Unuaklasa Servo

Faklerta laboro.

Korespondas en Esperanto.

FONDAĴO M. Jaumotte-Loquet

FONDAĴO por la **Disvastigo de la Informado pri ESPERANTO**

TRANSPENO	127.271
Danke al Eperanto-instruisto	
S-ano Van Humbeek -Anonime	500 F
Fraŭlino Bl. Geers (Antverpeno)	160 F
Gesinjoroj Mathieu-Plumhans	74 F
Sinjinorino L. Lecat	1.000 F
Koran Dankon !	129.005 F

(Pagoj akceptataj pere de la pĉk 291429 de Maertens Gr. Sint-Kruis)

FIRMA VAN ISEGHEM & VERSTRAETEN

P. V. B. A.


St.-Bernardse steenweg 631
Hoboken

Vitraloj - Speguloj -
„securit“ vitro
kolorigitaj vitroj
aluminiaj senmastikaj
stangoj por kupoloj

Vitro-cementoj por
tutvitra-konstruaĵoj
mastiko

Telefono 272875

Bibliografio Recenzoj



PROVOKA TRADUKARTO

"La Spleno de Parizo" de Charles Baudelaire. Enkonduko, elfrancigo kaj notoj de Paul Lobut. Eld. Koko, serio "Oriento-Okcidento" n-ro 8. Kopenhago 1987. 126 p.

Jen interesa beletraĵo de mondfama kaj ankoraŭ tre aktuala aŭtoro : libro klare presita sur bonkvalita papero ; unuvorte, bela eldono en la serio "Oriento-Okcidento". Plie, la tradukinto alloge prezentis la verkon : enkonduko pri Baudelaire ; traduko de la kvindek "prozpoemoj", la dediĉo al Arsène Houssaye kaj la epilogo, el kiuj konsistas "La Spleno de Parizo" ; postvorto pri kelkaj aplikitaj tradukprincipoj ; notoj pri pluraj nomoj kaj esprimoj, kiuj troviĝas en la teksto ; glosaro pri neologismo. Tamen, havante la libron en la mano por eklegi ĝin, oni ne esperu trankvile kaj serene pasigi la tempon ! Unue, estas en ĝi Baudelaire, tiu ege malkvietiga aŭtoro por nia t.n. "bona konscienco" ; kaj krome, estas en ĝi la tradukinto...

Precipe la arda progresemo de la dua riskas inciti multajn esperantistojn. Ĝi ankaŭ min incitis, kvankam mi certe ne apartenas al la "kelkaj samideanoj" kiuj, kiel diras Lobut, "sin krampas al stereotipaj formoj kaj obstine rifuzas evoluigajn ŝanĝojn kaj pliriĝojn". Sed ĝi incite efikis sur min pro tri kaŭzoj : 1-e, dum la legado mi ofte dubis, ĉu vere la "progresema" formo de la tradukinto estas la plej taŭga ; 2-e, kompare la originalo*, mi trovis lian tradukon kelkloke malpli preciza aŭ malpli klara kaj, precipe, malpli simpla ; 3-e, ankaŭ tre "liberala" gramatiko devas konsideri certajn formojn, kiujn oni renkontas en la teksto, kiel nekorektajn...**

* Mi konsultis : Charles Baudelaire, *Petits Poèmes en Prose* (Le Spleen de Paris). Texte établi et présenté par Daniel-Rops. Collection "Les textes français". Paris 1934.

** Mi kredas, ke ekzistas listo da postkorektoj, sed mia ekzemplero ne enhavas ĝin.

P.S. de la Red. Prof. G. Waringhien havis la ĝentilecon sendi al ni liston de postkorektoj kiujn ni publikigas ĉi sube. Ni kore dankas profesoron Waringhien.

p. 10	lin. 2	estis = esti	71	-11	ekkri = okkri
11	3	al = la	84	-4	trege = treege
47	-10	lia = sia	96	-3	sentis = sentas
68	2	mi = ni	118	3	Robinson = Robinsono
69	2	vi = mi	123	5	P = P kaj A
70	-9	vi = mi	125	-1	13-113 = 14-113

kovrilfaldo -3 en = ĉe

De ĉio ĉi tio oni ne konkludu, ke mi malkonsilas legi la libron. Kontraŭe, se oni atingis sufiĉan lingvan maturecon, oni legu ĝin, sed prudente kaj singarde; se eble, oni havu la originalan tekston sub la mano. Tiel oni povos profiti el la legado. Ĉiukaze, la tradukarto de Lobut ne enuigas. Karakterizas ĝin senĝena uzado de neologismoj kaj de formoj, kiujn la tradicia gramatiko ne allasas; ĝi do laŭesence estas provoka. Pro tio ĝi devas atendi de ni kontraŭstaron kaj reagon, sed siaflanke ĝi devigas nin re-kaj-ree pripensi kaj elprovi nian kutiman esprimmanieron. Jen kial ĝi ankaŭ freŝe kaj vivige efikas. Krome, estas tute nature, ke la kontrabandaj vortoj kaj formoj, kiujn oni vole-nevole jam delonge akceptis en la "poesia lingvo", provas penetri en la domenon de la prozo, precipe en la limzonon, al kiu unualoke apartenas la "poemo en prozo".

En lingvaj aferoj oni ofte vidas, ke same "tradicistoj" kiel "progresistoj" iel ajn apogas siajn vidpunktojn per la aŭtoritato de Zamenhof. Kvankam tio kaŭzas malĝentilajn kaj senutilajn disputojn en la samideanaro, tio estas ĝojiga signo pri la vivŝancoj de la internacia lingvo: ambaŭ partioj restas firme ligitaj al la centro. Ankaŭ Lobut subtenas per la aŭtoritato de Zamenhof (kaj Privat) sian vidpunkton kaj verŝajne li havas neniun dubon, ke li pravas. Sed laŭ mi, la vero sin kaŝas ĝuste en la detaloj, kiujn li preteratentas. Ekz. laŭ Lobut, "Zamenhof deklaris, ke sentuŝe al la Fundamento, la tuta lingvo povus rajte evolui ĝis plena nereconebleco!". La nedifektita vero tamen estas, ke refutinte la opinionon, ke la Fundamento iel baros la liberan evoluon de la internacia lingvo, Zamenhof rimarkigis, ke "ĝi donas la blon, se tio estus necesa, iom post iom eĉ ŝanĝi la tutan lingvon ĝis plena nereconebleco." En tiu eldiro la gravajn limigajn vortojn "se tio estus necesa", "iom post iom" kaj "eĉ" Lobut do malprave forstrekis.

Unu konsekvenco de la tradukarto de Lobut estas, ke mi devis tro atenti lian ĉeeston en la libro. Mi honeste konfesas, ke por mi, kiu postulas, ke tradukanto plejble plenumu sian humilan taskon "en la ombro de la originalo", tiu konsekvenco estis iom ĝena kaj neeviteble influis la tonon de mia recenzo.

A. Samyn

ESPERANTO KAJ MEDICINO.

En "Esperanto-Gazeto" de okt. '69 sur p. 8, D-ro Molnar Lajos el Budapeŝto (adreso: Hospitalo Laszlo; Gyali u. 5-7, Budapeŝto IX) priskribas jenan planon.

La esperantistoj-medicinistoj devus redakti UNU regule aperantan REFERATAN revuon, kiu, krom originalaj artikoloj kaj referaĵoj, ĉefe aperigus tradukitajn resumojn de gravaj artikoloj el la naciaj medicinaj revuoj. Ja tre ofte la kuracistoj ne scias pri gravaj artikoloj kiuj ie aperas en rilato kun la specialaĵo de tiuj kuracistoj. Nun ili ricevas informojn pri tio. Plie, se oni havas ankaŭ la adresojn de aŭtoroj, la interesigantoj povus peti apartpresaĵojn de tiuj artikoloj aŭ resumoj. Fine, post iom da tempo oni disponus pri riĉa dokumentaro kiun oni povus montri al medicinistoj-neesperantistoj, al diversaj institutoj ktp. Tio certe farus impreson kaj pruvus la taŭgecon de Esp.

Ni opinias ke la plano estas tre interesa. Samideanoj-kuracistoj bonvolu sciigi sian kunlaboremon kaj siajn sugestojn al adreso supre indikita.

karavano al la suno...

Tri fojojn ni traveturis en internacia amika rondo grandan parton de eŭropo por ĉeesti la universalan kongreson.

Ĉi-foje, Vieno nin vokas! Sed alia tre interesa urbo estas tute apuda: Budapeŝto, ĉefurbo de Hungario. Revononte, ni suden iros, ne nur por sunbani ĉe la adria marbordo, sed ankaŭ por vidi la koron de tiu jam parte orienta lando: Sarajevo kaj Mostar.

Dimanĉo 26.7.70 : foriro en Bruĝo, laŭ Bruselo kaj eventuale Lieĝo. Tranoktado en Heidelberg. Bavarujo kaj Salsburg por alveni en Vieno, vendredo-vespero la 31.7.70 (tutaga restado en Bavario kaj Salzburg). Diversaj vizitoj, i.a. Königsee, kaj saltminejo. Jam tiu parto de la vojaĝo klopodos kontentigi ĉiujn ĉar Bavario estas naturmirindaĵo kaj Salzburg estas tre bela baroka urbo.

De sabato 1.8.70 ĝis merkredo 5.8.70 ni restaĉos en Vieno por ĉeesti la kongreson.

Ĵaŭdo 6.8.70 : la kongreso ekskursos la tutan tagon, kaj ni profitos por transiri la landlimon kaj alveni en Budapeŝto (vizito al folkloro festo, rondvidado ktp.)

Vendredo 7.8.70 ĝis ĵaŭdo ni vizitos grandan parton de Jugoslavio: Sarajevo, Mostar, Split, ŝibenik, Zagreb kaj Ljubljana: oriento kaj okcidento, kruda pejzaĝo kaj ĉarmaj marbordoj, turkaj konstruaĵoj kaj romaj ruinoj: la BEF-karavano prezentas ĝin al vi kiel en kalejdoskopo.

Vendredo 14.8.70 : foriro de el Ljubljana laŭ la unika Groszglockner-hochalpenstrasse hejmen por alveni en Bruĝo dimanĉo vespere 16.8.70.

KONDIĈOJ : **22 tagoj** en unuaklasaj hoteloj sen kromaj kostoj kaj enkluzive de la vizitoj en Salzburg, Budapeŝto, Sarajevo ktp. kaj la trinkmono de la ŝoforo: 13.000 F po persono (+ 600 F por unupersona ĉambro kie tio eblas).

ENSKRIBO : tuj, per antaŭpago de 2.000 B.F. je poŝtkonto de Maertens G. Sint-Kruis, nr 291429 aŭ je la konto de nr 01193 de S-ino Maertens-Mallet ĉe Kredietbank, Sint-Kruis.

Jam enskribis 15 personoj inter kiuj ses gejunuloj de la junulargrupo Sint-Kruis.

Oni povas enskribi por parto de la vojaĝo : 1) 26.7.70 ĝis 31.7.70
2) 6.8.70 ĝis 16.8.70

Oni povas plimalalti la kostojn mendante duonpensionon por la restado en Vieno (5 tagoj) per 750 F do tiam la tuta sumo estus nur 12.250 F. En Vieno estos multaj eblecoj por manĝeti kaj se oni ne devas reiri al la hotelo por tagmanĝi, la programaranĝo iĝas pli facila.

Pliaj informoj: BEF-Karavano, Prins Leopoldstraat 51. 8310 Sint-Kruis

ANTVERPENO

Esperanto-grupo "La Verda stelo"

Kunsidoj : Ĉiumerkrede en Brasserie
"Capitole", Gemeentestraat 15

2000 Antwerpen, je la 20.15a horo.

Postĉekkonto : 726.54

Pro laboroj en nia kunvenejo, la "Libertempa Atmosfero" de la 29-a de Augusto okazis en la "Antwerps kof-fiehuis", kie s-ro Verstraeten parolis pri ĉiuj novajoj en Esperantujo dum la pasinta monato.

La postan semajnon s-ino Imelda Haasen gvidis "Artan Fabelan Vesperon". Post enkondukaj lumbildoj el diversaj esperantlingvaj fabelaroj, oni skizis la historion de la fabelo. Kun belega muzika fono venis diversaj ŝatindaj fabeletoj, i.a. Pantoflokatinio kaj la bone konata "La vestoj de la reĝo", ĉi tradukita de d-ro L. Zamenhof.

La 12an de Septembro, la film-triopo Montmirail-Peeraerts-Van Eynde enuigis nin tre, montrante dum varmega vespero filmojn pri ankoraŭ pli varmegaj landoj! Feliĉe filmo pri ĉampano iome malsoifigis la 24 spektantojn..

"El Esperanta Ridpunkto" estis la titolo de vespero dum kiu nia sekretario Paul Peeraerts paroladis pri la humoro en la esperanta literaturo. La prelego komenciĝis per filologiaj klarigoj pri la diversaj specoj de humoro kaj poste, kun la helpo de Agnes Geelen, Ivo Durwael kaj Jo Haasen, oni aŭdigis diversajn partojn el la verkoj de Raymond Schwarz, Romain Dobrzynski, Paul Veenman, Adolf Sproeck kaj aliaj konataj kaj malpli konataj humoristoj.

Pere de multaj bone elektitaj lumbildoj kaj diapozitivaj, akompanitaj de trafa komentario, la paroladisto s-ro Renato Balleux pruvis - la postan semajnon - ke tiuj kiuj pensas koni sian landon estas malpravaj. Efektive, tiun vesperon multaj renkontis ankoraŭ ne konatajn lokojn en nia provinco Okcident-Flandrujo.

La 3-an de Oktobro, s-ino Lecat Levis por ni la vualon kiu kovras la grandegajn sfinksojn kaj piramidojn de la sekreta Egiptujo. Ni aŭdis interalie pri la historio, la konstruado de la piramidoj, la malfacila religio, la diajoj, kpt. kpt.

La titolo de la vespero de la 10-a estis "Ekonomiaj trajtoj en nia lando". Tiu ĉi sufiĉe ĝenerala priskribo rezui-

GRUPA VIVADO

tis en eksterordinare interesa babilado pri la briko kaj la mondo kiu ĉirkaŭas ĝin. Venis centoj da sciindaj faktoj pri la argiltavoloj, la farado de la briko, ĝia formo kaj formato, bonaj kaj forjetindaj brikoj kaj tiel plu.

Nekutima, altvalora, interesa, estas ĉiuj ecoj kiuj estas aplikeblaj al la parolado de s-ro Chris Declerck "Kosmologio de Martinus kaj la senco de la vivo", kiun li faris dum la unua merkreda kunveno en la historio de la Verda Stelo. S-ro Declerck interalie eksplikis la rilatojn inter scienco kaj religio, inter diversaj religioj reciproke, la klarigon de la leĝoj de la ekzisto kaj aliajn konceptojn de Martinus.

Iome malfrue venis ĉi-jare la "Libertempaj raportoj" la 22-an de oktobro. Tiun ĉi okazon prenis s-ro Remy Van Eynde por sprite rakonti pri siaj travivaĵoj dum la internacia feriosemajno en Krommenie. Same sprite rakontis Jo Haazen pri vojaĝo al Leeuwarden kaj s-ino Lecat pri Helsinki kaj Leningrad.

Pli granda nombro ol kutime ĉeestis la paroladan kun diapozitivaj de s-ro de Roover pri la Luneburga Erikejo. Kiel ĉiam, nia profesoro komencis per detala trarigardo de la vojaĝo pere de klaraj mapoj. Post la paŭzo li montris al ni kolorajn diaĵojn pri tiu bela germana regiono.

La mitulvespermanĝo estas ĉiam unu el la ĉefpunktoj de la grupa vivo en Antverpeno. Pli ol 50 el niaj membroj kune manĝis, trinkis kaj babilis en bela salono en la centro de la urbo. Kiel specialan eron, nia «animantino» Agnes Geelen gvidis la elekton de la "Reĝino de la vespero". La ĉeestantoj voĉdonis kun granda plimulto por la tre simpatia s-ino Lecat, kiu iome nekredante akceptis la kolĉenon de la "Ordo de la Mitulo".

La 12-an de novembro s-ro Lernout gvidis nin tra la pasinteco, montrante filmojn pri Esperanto-kongresoj en nia lando antaŭ la milito. Same por la personoj kiuj tiam jam ĉeestis kiel por

la novuloj, tiu rerigardo estis tre interesplena.

La 19-an estis denove filmvespero, sed nun organizita de s-roj Van Eynde kaj Peeraerts. Inter la filmoj estis unu tradukita en esperanton kaj adaptita kun plaĉa muziko fare de tiu ĉi lasta. La temo estis "La nutrado de la patrinino tuj antaŭ kaj post la naskiĝo".

El la raportoj de Ria de Cleyn, Rik de Roover kaj Paul Pecraerts.

REGA ESPERANTISTA BRUSELA GRUPO
Kunsidoj : Ĉiulunde je la 20a horo en nia kunvenejo Hotel "Exelsior"
7, rue du Progrès, Bruselo.

La 1-an de septembro (la unua kunsido post la libertempa periodo) F-ino Opsomer plenigis la programon per raportado pri la Internacia Kongreso en Helsinki.

La 6-an, sabate posttagmeze, la bruselaj gesamideanoj kuniĝis por komuna visito al la tombo de S-ro Oleffe en Wozembeek. En ĉeesto de S-ino Oleffe, S-ro Jacobs prononcis kelkajn amikajn vortojn al la memoro de nia iama sindona membro Jean Oleffe kaj F-ino Opsomer metis florbukedon nome de la brusela grupo sur la tombo. Estis mallonga emociplena ceremonio.

La 8-an okazis parolata ĵurnalo. Por la serio "A" S-ro Castel kaj S-ro Van der Stempel akiris la plej altajn poentojn por "Historietoj" kaj por "La misio de Israelo". Por la serio "B" S-ino Ernst akiris la plej altajn poentojn por la "Mistera ŝtelisto".

La 15-an S-ro Van der Stempel gvidis la perfektigan kurson kun kutima afableco kaj kompetenteco.

La 22-an Dr. Wim de Smet parolis pri "Delfenoj" kaj komentariis diapozitivajn, klarigante la anatomion de tiuj fisosimilaj animaloj, kiuj tamen estas mambestoj el la familio de balenoj. Vera spertulo en tiu fako, Dr. de Smet rakontis ankaŭ pri narvaloj kaj kaĉalotoj.

La 29-an S-ro Van der Stempel gvidis debatvesperon pri elektita temo el la parolata ĵurnalo, nome pri la "misio de Israelo". La ĉeestantoj vigle partoprenis al tiu tre interesa debatvespero.

La 6-an de oktobro okazis nia parolata ĵurnalo. Por la serio "A" S-ro Fighiera akiris la plej altajn poentojn

por "Raporto pri Hongkong". Por la serio "B" S-ino Ernst akiris la plej altajn poentojn por "Feliĉa edzeco".

La 12-an (dimanĉe) okazis la brusela ĵara festeno honore al S-ino Stern (25 jaroj da membreco). Multnombro kaj en tre amika kaj gaja atmosfero la gesamideanoj de Bruselo kaj de Antverpeno kuniĝis ĉe festa bongusta tablo. Tre ĝojiga estis la revido ĉe ni de S-ro Jaumotte en bonega sanstato akompanata de sia edzino.

La 13-an S-ino Elly Staes rekomentariis, laŭ ĝenerala peto, la libron de Gustav Glück pri Peter Breughel de Oude kun belegaj bildoj. Dankon al S-ino Staes por tiu altvalora prelego.

La 20-an S-ro Van der Stempel gvidis la perfektigan kurson kun kutima kompetenteco.

La 27-an S-ro Jacobs aŭdigis al ni per sonbena prelegon pri la "Lago de Iseo" kun ravaj diapozitivaj kaj kun adaptita muziko, jen gajaj jen sentimentalaj popolkantoj.

LES ENTREPRISES

DERKS

226, Rogierstrato, BRUSELO 3

Tel. : 16.89.92 Entrepreno de
KONSTRUAĴOJ

La revuo kiu progresas,

ĉar ĝi plaĉas
"KULTURAJ KAJEROJ"
ĝi, vere internacia, alportas
artikolojn plej diversajn
bele ilustritajn
facile legeblajn
kaj novajojn de la
Esperantista Kulturdomo
"Gresillon"

BAUGE - 49 - Francujo.

Por vi mem, via klubo, viaj amikoj,
petu prov-numeron kontraŭ respond-
kuponon al S-ro Babin, prezidanto de
la E. K. D.

13, Boulevard de la Chauvinière

- 44 - NANTES - Francujo.

BRUGA GRUPO ESPERANTISTA - REGA SOCIETO

Kunveno : mardo je la 20-a horo, en "Strijdershuis" Hallestraat 14, (apud Markt).

**Adreso de la prezidanto : Ch. Poupeye, Philips de Goedelaan 17-B
Tel. (050) 183 58**

Dum oktobro kaj novembro la grupoj kelkfoje kunvenis en "Strijdershuis" por preparoladi interesajn aktualaĵojn koncerne nian movadon. Tiel okazis debatoj la 28an de oktobro pri la Markola Kongreso de Tournehem (Francujo, 1-an de majo) kaj la 18an de novembro pri la Trilanda Kongreso en Aachen (Pasko 1970-a)

Programmo por januaro kaj februaro 1970a :

La 13an de januaro komenciĝos nova supera kurso kun pliaj lecionoj la 3an kaj la 17an de februaro.

La 27an de januaro okazos la ĝenerala jarkunsido. Neniu forestu !

Post la unua horo de ĉiu kunveno : interparolado, komunikadoj, debatoj. Specialaj paroladoj kun filmoj aŭ diapozitivaj estas en preparo kaj estos eventuale aparte anoncataj.

"Paco kaj Justeco" Brugge

Se juĝi laŭ la ŝajno, nia grupo neniam floris kiel nun ; Ĉiuj lastaj kunvenoj estis festkunvenoj... kiuj estis multnombre ĉeestataj ; La estraro intencas daŭrigi tiel. Bone. Nur unu danĝereto : se tiel la grupo sentas bonfarton, ĝi ne embuskiĝu en sankta eŭforio. Ni speciale dankas gesinjorojn Alberto-Wijbouw el Aartrijke kiuj gastigis unu de niaj kunvenoj kaj montris diaojn pri Portugalujo ; kaj pri Esperantujo... en Grésillon.

"Junulara Grupo"

Sub prezidanteco de universitata studento Dirk Iserentant, filo de la direktoro de la instituto, tiu grupo tre regule kunvenas... kun allogaj kaj instruaj programoj. Flanke de la limigita estraro gvidas ĝin ankaŭ 'Konsilantaro' Bona solvo. Ankaŭ la distran kaj ĝeneralklerigan okupojn la grupestraro ne forgesas. Bonege ; Ĝis nun ni aŭdis nur laŭdojn pro la intereso de la kunvenoj.

La 19-an de decembro ili organizis en kunlaboro kun la junulkomitato de Sint-Kruis, debatvesperon pri moderna muziko. Pli ol 5.000 cirkuleroj disdoniĝis en la lernejoj kaj 200 aĵoj diskonigis la okazantaĵon.

LIEGO

La 28an de sept. okazis la vojaĝo al Waterloo, kie ni renkontis gesamideanojn el Bruselo kaj Charleroi, kun kiuj ni disdonis flugfoliojn pri Esp. La veturkonkurso gajnis S-ino Lejeune.

Ni kunvenis kaj kunvenas regule ĉiun duan semajnon. Inter la plej interesaj ni citu : sciigoj pri skoltoj - diapozitivaj pri centra Eŭropo, fare de prf. Kuster - Kio estas la movado "Jean" ? de F-ino Wolff.

La 19-an de okt. ni partoprenis renkontiĝon en Verviers. Finiĝis la kurso por geinstruistoj en la "Ecole Pédagogique Supérieure". Malmultaj sed valoraj geinstruistoj montris dum la ekzameno sian kapablon instrui nian karan lingvon. Dankon al ĉiuj partoprenintoj, kaj speciale al S-ro Verstraeten kiu kuraĝis veni de tiel malproksime.

LOVENA ESPERANTO-ASOCIO Naamse straat 78 Leuven

Dum la lastaj monatoj okazis sufiĉe multe en nia malgranda familio.

Unue ni eniris en la tielnomata F.L.E. (federacio de Lovenaj asocioj) kiu fakte estas embrio de la urba Kulturkonsilantaro. En tiu medio, mi reprezentas, kiel sekretario de la Lovenaj Eo Asocio specialan fakon. Sed pro la geografia, socipolitika, kultura situacio en nia lando, mi opinias ke nia ĉeesto estas nepre necesa, ke la neĉeestantoj ankaŭ tie, ne estas pravaj. Kaj estas en ĉi tiu federacio jam iuj, kvankam nekonvinkitaj pri la ebleco de la Esperantolingvo, kiuj ne konsideras E-on kiel amuzilon por plenkreskuloj.

Due en la junulargastejo ni nun kunvenas ĉiun monaton je la unua merkredo ; ŝajnas ke estas la plej taŭga solvo, pro la fakto ke malgrandnombra klubo ne povas postuli salonegon en trinkejo privata, ke la junulargastejo estas taŭga loko kiu prezentas eblecojn por ĉiuj, precipe ĉar ĝi havas neŭtralan koloron. Tie ankaŭ okazas nova kurso gvidata de S-ino Meurrens kun kvin lernantoj ; tri universitataj studentoj el Limburgo kaj du Ateneaj lernejoj.

Statis sur nia programo : Parolata Jurnalo, Superrigardo al Eo gazetaro, Krucvortengimoj, Ludoj, Filmo pri Ba-

lonkaptado en Norvegujo fare de Jef Laenen, diapozitivaj pri nia vojaĝo al la Madridkongreso fare de S-ino Meurrens. Por nia venonta kunveno diapozitivaj kun traduko en Eo.
Denove ni klopodas kantigi la membraron el nia Esp-repertuaro, kvankam malfacila tasko. Tamen kantado prezentas nur bonajn flankojn ; ni ja ne forgesu ke kantanta popolo neniam pereas. Do same por nia esperanta. En oktobro ni vizitis grupe la pentra-

jekspozicion organizitan en la urbodomo de nia samideano Marcel Cockx (la enscenigisto de Flego) al kiu unufoje la urbestro konsentis ekspozicii en la enireja granda salono. La urbestro kun skabenaro malfermis la prezentadon en ĉeesto de nia ĉefministro Eyskens. Antaŭ nia foriro Marcel Cockx regalas la esperantistaron kiu elkore gratulis nian Lovenan artiston kun deziro de daŭra sukceso. Raporto fare de Ghislain Jacobs, sekretario de L. E. A.



Ensendojn por la
somera

numero ni petas

antaŭ la 16.5.1970

(aperdato en junio)

KOMUNIKO de la Internacia Scienca Asocio Esperantista.

La membrakotizo por 1970 plus abono je la revuo estos 50 steloj. Por studentoj tiu kotizo estos 30 steloj kondiĉe ke la aliĝo okazu pere de STELO (= Studenta Esperanto-Ligo).

La revuo aperos sesfoje jare po almenaŭ 32 paĝoj. Tio signifas ke se pro iu ne antaŭvidita kaŭzo devus aperi duobla numero, ke ĝi havos almenaŭ 64 paĝojn.

La redakcio konsideras la eblon de aperigo de unufakaj numeroj. Kelkaj sekcioj de I.S.A.E. ne ankoraŭ povas aperi propran revuon. Ili povas nun prepari siafakan materialon por speciala numero : ekzemple : filologia numero, astronomia numero kpt.

I.S.A.E. atendas multajn aliĝojn kaj entuziasman kunlaboron.
Adreso : Prof. D-ro Boj. Popoviĉ ; Ognjena Price 80 Beograd ; Jugoslavio.
Por nia lando : D-ro Wim De Smet, Wilgendreef 14 Heide Kalmthout.

Mi deziras korespondi por interesanĝi postmarkojn.
Mia adreso estas :

S-ro Ivan Gerogiev Ivanov
Ul. Hristo Botev Blok B Vhod A Ap. 6
Gabrovo Bulgario

manufakturaĵo firma DE BROUWERE

Magdalenastraat 29 Kortrijk (Belgujo) - Tel. (056)216.54



VIRINAJ BLUZOJ **" MAGDELEINE "**

deponita kvalitmarko
por la eleganta sinjorino
la perfekta konfekcio
fabrikita el plej
altkvalitaj teksaĵoj

Haveblaj en la bonaj
konfetcibutikoj

PRECIPAJ CENTROJ :

Antwerpen : Aalmoezenierstr. 2
Anselmostr. 17
Nationalestr. 87
Leysstraat 10

Arlon : 12 Marché-aux-Légumes

Brugge : Breidelstr. 8

Brussel : Anspachlaan 194
Oude Kleerkoperstr. 31

Gent : Brabantdam 21

Herstal : 4 Rue Large Voie

Leuven : Bondgenotenlaan 13

La Louvière : 16 rue Albert 1er

Luxembourg : 67 Place de la Gare

Mechelen : IJzeren Leen 32

Oostende : Kapelstraat 23

Roeselare : Ooststr. 124

Tournai : 75 Rue Royale

Turnhout : Herentalsstr. 6

Verviers : 2 Pont St. Laurent

Wetteren : Jos Buyssestr. 39-a